

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Multaj esperantistoj deziras foje ellerni la lingvon internacian. Ne ĉiuj povas tiucele viziti la internaciajn kursojn en Helsingör aŭ Grésillon. De nun ili sciu, ke ekzistas tute taŭga lernolibro.

A.- Tiu lernolibro estas titolita *Paŝoj al plena posedo*.

Cl.- Ĝin verkis William Auld kaj ĝi estas merkata sukceso. Kiel vi certe aŭdis, en kelkaj monatoj elĉerpiĝis la unua eldono. Nun estas aĉetebla la dua eldono.

A.- Ĉar ĝi estas presita en Pollando kaj vendata de *Heroldo de Esperanto* kaj de *Ĉeĥa Esperanto-Asocio*, ĝi estas same bone aĉetebla en la orient-eŭropaj landoj, kiel en la aliaj tiel nomataj pagipovaj landoj.

Cl.- Ni ne volis paroli pri tiu libro antaŭ ties grupa eksperimentado. Nun la eksperimentado de la unua ĉapitro, kiun William Auld nomas la unua paŝo, okazis en triopa studrondeto, kaj mi povis konvinkiĝi pri la taŭgeco de la instrumaterialo.

A.- Ĉiu leciono aŭ paŝo komenciĝas per **vortaro**. Sekvas **legaĵo**, kaj poste **ekzercoj** unue kontrolas, ĉu la studanto bone komprenis la tekston kaj poste instruas nuancojn de la esperanto-gramatiko kaj de la vortfarado.

Cl.- William Auld donas konsilojn, kiuj indas esti sekvataj :

A.- « *Tiu ĉi libro estas planita tiel, ke ĉiun « paŝon » la studanto komencu per legado de la legaĵo. Kiam li renkontas vorton, kiun li ne konas, aŭ kies signifon li ne povas diveni laŭ la kunteksto, nur tiam li sin turnu al la sekcio « Vortaro », kaj pere de la klarigo tie donita li klopodu kompreni la sencecon de la vorto en ĝia aktuala kunteksto. Nur en okazo de absoluta bezono, aŭ eventuale por kontroli sian koncepton pri la signifo de la vorto, li sin turnu al nacilingva vortaro. »*

Cl.- William Auld daŭrigas : « *(La difinoj en tiu ĉi libro ne celas esti kompletaj kaj definitivaj – tio ja estas la tasko de la vortaristoj ; ili celas nur ebligi al la studanto kompreniĝon pri la kuntekste uzita vorto.) »*

A.- Kaj poste William Auld tiel difinas la celon de tiu ĉi agmaniero :

Cl.- « *Liberiĝi kiel eble plej komplete el la katenoj de la nacilingva pensado. »*

A.- Por favori tiun liberiĝon ni konsilas uzi la *Plenan Vortaron* aŭ la *Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto*, kiam la simplaj difinoj de William Auld ne sufiĉas, prefere ol nacilingvaj vortarojn.

Cl.- Tiu libro *Paŝoj al plena posedo* povas esti individue aŭ kolektive uzata. Al la personoj, kiuj ĝin individue uzos, ni konsilas kontroli la ekzercojn fare de kompetenta esperantisto.

A.- En Svislando, en la kadro de la aktiveco de Kultura Centro Esperantista, estis starigita korektada servo, al kiu iu ajn esperantisto povas sin turni. Nun jam bone funkcias la franclingva sekcio, kaj ni trovis kunlaborantojn por la itala kaj germana sekcioj. Post kelkaj semajnoj aŭ monatoj ĉiuj esperanto-lernantoj estos informataj pri tiu korektada servo, ĉar en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj, kiujn ni vendas, ni aldonas informilon, kiu diras, kiel oni povas uzi tiun servon.

Cl.- Oni simple sendas siajn ekzercojn aŭ tradukaĵojn al la donita adreso, ne forgesante meti sian nomon kaj adreson, la titolon de la lernolibro kaj la numerojn de la koncernaj paĝoj.

A.- La uzanto devas aldoni koverton jam afrankitan kaj jam adresitan por la resendo de la korektitaĵoj, kaj li devas aldoni modestan kontribuadon, kiu respondas al unu internacia respond-kupono, tio per poŝtmarkoj, aŭ se li loĝas ekster Svislando, per aldono de respondkupono.

Cl.- Jam pluraj dekoj da gelernantoj profite uzadis la francan sekcion de tiu korektada servo. Kaj ni povis konstati, ke ili rapidege fariĝis lertaj esperantistoj. Nun pluraj el ili lertiĝas en esperanto helpe de la libro *Paŝoj al plena posedo*.

A.- La plimulto de la esperantistoj ne trastudos libron kiel *Paŝoj al plena posedo*, se ili devos individue labori. Ili bezonas la instigeman etoson de la kolektiva studado. Pro tio ni konsilas al vi, en la kadro de via loka grupo, malfermi studrondon por progresantoj.

Cl.- Kiu devos gvidi tiun studrondon, tiu individue trastudu la 30 ĉapitrojn de *Paŝoj al plena posedo* kaj kontroligu siajn ekzercojn. Li devus sin submeti al ĉiuj konsilataj laboroj, eĉ kiam temas pri redaktado, por ke li povu doni ekzemplojn kaj por ke li akiru veran certecon pri la propraj lingvosciroj.

A.- Nur tiel li kapablos vere gvidi studrondon. Kaj tiu gvidado ne devus esti lernejeca. En la grupa studado li devus akcepti refariĝi lernanto. Gvidi ne signifas ordoni kaj tedi la aliajn grupanojn.

Cl.- Ni konsilas formi malgrandajn studrondojn kun minimume tri kaj maksimume dek partoprenantoj. Kaj ni konsilas tiun ĉi marŝadon :

A.- Estas bone dufoje legi la legaĵon. Sed por ne tedi la studantojn, vi povas uzi la rimedon de registriilo. La unuan legadon vi registras. Ĉiu vice legas ĝin ĝis la venonta punkto. Poste vi aŭdigas la registraĵon. Ĉiu ŝatas sin reaŭdi, kaj la reaŭdado fakte signifas relegadon de la teksto.

A.- Poste vi malfermu diskuton pri la teksto mem. Ĉiu faras demandojn pri nekomprenitaj frazoj, serĉas en la vortaro la signifon de la nekomprenitaj vortoj, esprimas sian vidpunkton rilate al la asertoj de la teksto.

Cl.- Nur poste vi ekstudu la ekzercojn. Ĝenerale la unuaj kontrolas, ĉu la studentoj bone komprenis la tekston. Tiuj ĉi estas lerte ellaboritaj kaj evitas la tradukadon. Poste sekvas ekzercoj pri gramatikaj kaj vortfaradaj punktoj. La venontan semajnon ni donos al vi kelkajn ekzemplojn pri ili, por instigi vin aĉeti tiun utilan libron kaj eble malfermi ĉe vi studrondon por progresantoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-